# 21. Kie ni staras? Kie ni loĝas?





Kato kuŝas apud la domo.
Adelo sidas en la domo kun sandviĉo.
Rikardo sidas sur la domo.
Li havas kajton.
Maria estas en la tendo kun pupo.
Habibo staras inter la tendo kaj la domo.
Iŝtvano staras sub la kajto kaj levas ĝin.





*Faru demandojn per "Kie", "Kiu" kaj "Ĉu"*
*Ekzemple: Ĉu Habibo estas sub la kajto? Ĉu Rikardo sidas en la domo aŭ sur ĝi?*








**Demandoj:**
1. Ĉu Petro loĝas en tendo? Ĉu Rikardo loĝas en tendo? Kie li dormas? Kun kiu?
2. Ĉu Mateo dormas en tendo? Kie li dormas? Ĉu Adelo sidas apud tendo?
3. Ĉu Tuktruk dormas en tendo? Kie ĝi dormas? Inter kiu kaj kiu?
4. Kio estas inter tendoj unu kaj tri? Kiu sidas inter Natalio kaj Habibo?
5. Kie staras Veroniko? Kie sidas Habibo? Kie staras domo du? Ĉu Luiĝo sidas?
6. Kiu dormas en domo, sed ne kuŝas sur lito? Kiu dormas apud ŝi?

<u>Kie</u> dormas la kato? <u>Tie</u>! Tie, en tiu loko!



## 22. Kie estas la trezoro? Tie!



Rikardo havas mapon. Li studas ĝin. Ĝi estas trezor-mapo. Ĝi montras la lokon de trezoro! En kiu loko estas trezoro? Kie ĝi estas? Sur la mapo estas la litero X (ikso). La trezoro estas en tiu loko. Tie ĝi estas! La ikso estas inter arbo kaj domo kun parabola anteno. Rikardo rigardas la urbon. Li vidas arbon kaj li vidas domon. La domo havas parabolan antenon. Bone! Ek! Al la laboro!

Rikardo fosas. Li fosas kaj fosas. Sed li ne vidas trezoron. La persono kiu loĝas en la domo vidas Rikardon. Li vidas personon kiu fosas en la ĝardeno. “Hej! Kion vi faras?” li kolere demandas.
“Mi fosas por trezoro!” respondas Rikardo.
“Terura knabo! Fosu en alia loko! Mia ĝardeno ne estas loko kie vi fosu por trezoro!”





Rikardo rigardas la urbon denove. Hmm. Problemo. Granda problemo. Jen arboj. Multaj arboj. Jen domoj. Multaj domoj. Li vidas multajn arbojn kaj li vidas multajn domojn. La domoj havas parabolajn antenojn. Rikardo vidas multajn domojn kun parabolaj antenoj. Do, inter kiu arbo kaj kiu domo li fosu? Li ne scias. Li ne scias kie li fosu. Kompatinda Rikardo. Li estas kaj restas sen trezoro.

#### Ekzerco: Ligu frazojn per ‘kiu’

*Ekzemplo:* Mateo vidas homon. La homo saltas. → Mateo vidas homon, kiu saltas.

1. Rikardo vidas domon. Ĝi havas parabolan antenon.
2. Veroniko studas filozofion. Ŝi estas gvidanto.
3. Habibo sidas apud domo du. Li estas afrikano.
4. Knabo fosas en la ĝardeno. Li estas terura.
5. Jen la litero “X” sur la mapo. Ĝi montras la lokon de la trezoro.
6. Jen persono. La persono loĝas en domo. Apud tiu domo fosas Rikardo.

#### Ekzerco: Ligu frazojn per ‘kie’

*Ekz.:* Mi vidas lokon. En tiu loko estas trezoro. → Mi vidas lokon, kie estas trezoro.

1. Roĝero montras muron. Sur tiu muro pendas dek boteloj.
2. Jen tendo tri. En tiu loko loĝas Roĝero kaj Luiĝo.
3. Jen la planko en domo tri. En tiu loko dormas la kato.
4. Jen la lito de Rikardo. Sur tiu lito Habibo saltas.
5. Maria havas libron. En tiu libro estas bela bildo de la futbalisto Pele.
6. Jen la granda tendaro. En tiu loko kun-venas infanoj el diversaj landoj de la mondo.

**Gramatika Matematiko aŭ Matematika Gramatiko:**

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Jen… | bel**a** dom**o** |  | Mi vidas… | bel**an** dom**on** |
| | bel**a** dom**o** |  | | bel**an** dom**on** |
| + | ———-- | +—— | + | —————- |
| | bel**aj** dom**oj** |  | | bel**ajn** dom**ojn** |

# 23. Kie estas logika loko?




**Rikardo:** Aniko, kie estas via libro pri origamo?
**Aniko:** Mi ne havas ĝin kun mi.
**Rikardo:** Kie estas ĝia loko? Ĉu ĝi havas lokon?
**Aniko:** Jes, ĝi havas lokon. Apud mia lito.
**Rikardo:** Tio estas logika loko. Ni rigardu tie!
**Aniko:** Bone! *(Ŝi rigardas)*. Ne, Ĝi ne estas tie.
**Rikardo:** Ĉu ĝi estas en tendo unu?
**Aniko:** Ne, tio estas mallogika loko por mia libro.
**Rikardo:** Sed eble vi estas mallogika persono! Mi rigardu tie! *(Li rigardas)*.
**Aniko:** Ĉu ĝi estas tie?
**Rikardo:** Ne, ne estas tie. Ĉu ĝi estas en la bufedo?
**Aniko:** Ne. Tio estas mallogika loko por mia libro.
**Rikardo:** Sed eble…
**Aniko:** …eble mi estas mallogika persono? Eble. Rigardu tie. *(Li rigardas)*
**Rikardo:** Jes, jen ĝi! En la bufedo. Jen la libro — inter la bananoj!



Aktoru la dialogon denove. Estu alia persono kiu demandas kaj alia objekto kaj alia posedanto (al kiu apartenas). Objekto havas unu logikan lokon kaj du mallogikajn lokojn. Uzu la informojn el la tabelo. Aldonu vicojn al la tabelo mem!

| Kie estas | Posedanto | Logika loko | Mallogikaj lokoj |
|---|---|---|---|
| Libro | Aniko | Apud ŝia lito | En tendo unu / En la bufedo |
| Lud-serpento | Habibo | Sub lia matraco | En la lito de Aniko / En la limonado |
| Futbala pilko | Maria | En la sporta skatolo | En la branĉoj de arbo / Malantaŭ la televidilo |
| Martelo | Karlo | En la skatolo de laboriloj | Sur la pordo en domo 2 / Sub la aŭto de Mateo |
| Lud-aŭto | Rikardo | En la skatolo de ludiloj | Sub la arbo / Antaŭ la bufedo. |

### Ludu en via grupo!
Desegnu lokojn sur la suproj de skatoloj. Elektu objekton. Unu persono ne rigardas kaj la aliaj decidu en kiu skatolo estu la objekto. La persono revenu kaj demandu kie estas la objekto.

### Dudek demandoj!
Unu persono foriru de la kursejo kaj ne rigardu. Kaŝu objekton en la kursejo. La persono revenu kaj demandu – estu maksimume dudek (20) demandoj. Ĉu sukceso? Lernu la nomojn de objektoj kaj lokoj en via kursejo. Uzu la prepoziciojn kaj aliajn vortojn, ekzemple: Ĉu ĝi estas en tiu parto de la ĉambro? Ĉu ĝi estas en la supra parto de la ĉambro?

---

### Ni ludu tenison

Kie estas la…
…pilko?
…reto?
…batiloj?
…limonado?
…sun-ĉapoj?
…ĉemizoj
…tenis-ŝuoj?
…ktp.




### Ni ludu ŝakon!

Kie estas la…
…tabulo?
…tablo?
…figuroj?
…reguloj?
…horloĝo?
…ktp.

Vidu la bildon en ĉapitro 25.


### Ni ludu pupojn!

Kie estas la…

pupoj?
lud-domo?
pup-ĉapoj?
pup-roboj?
lud-serpento?
pup-pantalonoj?
pup-ĉemizoj?
pup-bluzoj?
pup-okulvitroj?
lud-aŭtoj?
lud-kuirejo?
pup-ŝuoj?
lud-mono?

# 24. Mi dormas tra la leciono!


Denove, estas leciono pri gramatiko en la tendaro. En ĉapitro sep vi vidas simplajn frazojn. La fraz-partoj staras en bobeloj. Jen ekzemplo kun unu-liga verbo kaj ekzemplo kun du-liga verbo:




La ekzemploj estas frazoj. Maldekstre (←) estas du-vorta frazo, dekstre (→) estas tri-vorta frazo. Sed Esperanto (kaj ankaŭ la vivo) ne konsistas nur el du- kaj tri-vortaj frazoj. Ni bezonas ankaŭ longajn frazojn. Ni uzu prepoziciojn kaj ni konstruu longajn frazojn!

Kio estas prepozicio? Ĝi estas vorto kiu indikas pozicion (lokon). Ekzemple: **en, sur, sub, super, apud, antaŭ, malantaŭ, kun**… . Kelkaj prepozicioj montras movon de unu loko al alia, ekzemple: **al, tra, el, de.** Estas aliaj prepozicioj, ekzemple: **pri, por…**


Ni montru frazojn kun unu-ligaj verboj:






**Iŝtvano:** Memoru! La ordo de vortoj aŭ fraz-partoj en la frazo estas libera. Uzu la frazon: 'La glaso falas al la tero.' Rediru ĝin kun alia vort-ordo! Kun bona vort-ordo.
**Natalio:** Falas la glaso al la tero.
**Karlo:** Al la tero falas la glaso.
**Roĝero:** La glaso al la tero falas.
**Iŝtvano:** Bonaj frazoj, bonaj respondoj! Ankoraŭ unu respondo?
**Naŭ-pieda eksterterano:** Glaso tero al falas la la.
**Iŝtvano:** Malbona frazo! Erara frazo! Tio ne estas bona frazo en Esperanto!
**Naŭ-pieda eksterterano**: Esperanto? Mi ne parolas Esperanton. Mi parolas la naŭ-piedan!

**Iŝtvano:** Ni ekzercu! Diru frazojn kun unu-ligaj verboj kaj prepozician aldonon!
**Rikardo:** Mi loĝas en Hamburgo. Mi venas el Germanio.
**Habibo:** Mi saltas sur la lito! Mateo venas al mi kaj li krias al mi.
**Adelo:** Mi kuras al la bufedo. Tie kuŝas sur teleroj multaj sandviĉoj.
**Iŝtvano:** Bonaj frazoj, bonaj respondoj! Ankoraŭ unu respondo… Dimitro?
**Dimitro:** Hu! Ha! Kio? Nu, pardonu… Mi dormas tra la leciono...
**Iŝtvano:** Bona frazo. Perfekta frazo. Gratulon.
**Dimitro:** Gratulon? Perfekta? Mi diras nur la veron!



# 25. Ni konstruu frazojn en Esperanto!

Jen la dua parto de la leciono pri gramatiko. Nun ni konstruas frazojn kaj ni uzas du-ligajn verbojn. Ankaŭ kun ili ni havu longajn frazojn. Ni uzu prepoziciojn.

**Saburo** — **konstruas** — **televidilojn** — **en** — **Japanio.**

**Natalio** — **montras** — **pupon** — **al** — **la tendaranoj.**

**Dimitro** — **ludas** — **ŝakon** — **kun** — **Petro.**




Faru frazojn el la fraz-partoj en la suba tabelo.
Faru dek bonajn frazojn kaj kvin strangajn frazojn.
Desegnu bildojn por la interesaj frazoj.


En la unua tabelo ni uzas unu-ligajn verbojn:

| **Subjekto** | **Unu-liga verbo** | **Prepozicio** | **Prepozicia fraz-parto** |
|---|---|---|---|
| Dimitro | saltas | en | la manĝejo. |
| La kato | krias | sur | la tegmento de domo du. |
| Veroniko | dormas | apud | la arbo apud tendo unu. |
| Rikardo | kuras | kun | la aŭto de Mateo. |
| La urso | staras | sub | seĝo en domo unu. |
| Natalio | studas | antaŭ | la flago de la tendaro. |
| Karlo | sidas | malantaŭ | la dua vagono de trajno. |


En la dua tabelo ni uzas du-ligajn verbojn:

| **Subjekto** | **Du-liga verbo** | **Objekto kun -N** | **Prepozicio kun ĝia fraz-parto** |
|---|---|---|---|
| Maria | gvidas | pupon | en la lasta vagono de trajno. |
| La kato | studas | flagon | sur la tegmento de la manĝejo. |
| Mateo | manĝas | libron | inter tendoj du kaj tri. |
| Roĝero | montras | lecionon | sub la granda arbo en la tendaro. |
| Naŭpiedulo | levas | bananon | apud la barilo de la tendaro. |
| Adelo | vidas | biciklon | antaŭ la televidilo. |
| Iŝtvano | prenas | sandviĉon | kun ses tendaranoj. |


# 26. Ni veturas! Jen transportiloj!





Kio estas tio?
Tio estas telfero




Kio estas tio?
Tio estas monociklo.





Kio estas tio?
Tio estas aviadilo.




Kio estas tio?
Tio estas tramo.





Kio estas tio?
Tio estas aŭtomobilo.





Kio estas tio?
Tio estas spac-veturilo
(fluganta sub-telero)



Kio estas tio?
Tio estas biciklo.




Kio estas tio?
Tio estas.
trole-buso. Ĝi
estas elektra
transportilo.




Kio estas tio?
Tio estas buso.




Kio estas tio?
Tio estas lokomotivo.
Ĝi estas vapora lokomotivo.





Kio estas tio?
Tio estas ŝarĝaŭto.
Ĝi estas dizela
ŝarĝaŭto.



Kio estas tio?
Tio estas triciklo.

1. Kio estas unu-rada?
   *La monociklo estas unu-rada.*
2. Kio estas du-rada?
3. Kio estas tri-rada?
4. Kio estas kvar-rada?
5. Kio estas kvin-rada?
6. Kio estas ses-rada kaj elektra?
7. Kio estas ses-rada, sed ne elektra?
8. Kio estas sep-rada?
9. Kio estas ok-rada kaj elektra?
10. Kio estas ok-rada kaj dizela?
11. Kio estas naŭ-rada?
12. Kio estas dek-rada?
13. Kio estas mult-rada?





Kio estas tio?
Tio estas trajno.
Ĝi estas elektra trajno.


1. Kio estas inter la buso kaj la ŝarĝaŭto?
2. Kio estas sub la aviadilo?
3. Kio estas super la trajno?
4. Kio estas apud la funikularo?
5. Kie estas la spac-veturilo?
6. Kie ...
7. ...

*Faru mem aldonajn demandojn!*

# 27. Urbetoj, urboj, urbegoj




Jen fiŝeto, fiŝo kaj fiŝego.
La fiŝo manĝas la fiŝeton.
La fiŝego manĝas la fiŝon.
*Demando:*
Ĉu la fiŝego manĝas la fiŝeton?



**LISTETO**

Veroniko havas listeton. .



**LISTO**

Mateo havas liston.




**LISTEGO**

Roĝero havas listegon.

**URBETO**:



**URBO:**



**URBEGO:**



Kio estas **urbo**? Budapeŝto, Havano, Helsinko, Fortalezo, Bruselo kaj Vankuvero estas urboj.

Kio estas **urbego**? Tre granda urbo. Meksikurbo, Londono, Nov-Jorko, Kairo, Parizo kaj Tokio estas urbegoj. Diru la nomojn de aliaj urbegoj. En kiu lando kaj kontinento ili estas.

Kio estas **lingvo**? La ĉina estas lingvo. La hispana estas lingvo. La angla, flandra, franca, hungara, japana kaj svahila estas lingvoj. Kiu estas via lingvo?

En Londono, personoj parolas angle. En Parizo, <u>oni</u> parolas france. En Budapeŝto, <u>oni</u> parolas hungare. En Tokio oni parolas japane. En Hamburgo, oni parolas germane. En Kairo, oni parolas arabe. *(Oni = personoj ĝenerale)*

Kio estas **ĉef-urbo**? Parizo, Berno, Bonaero, Kairo, Budapeŝto kaj Tokio estas ĉefurboj. Jorko, Nov-Jorko, Zuriko, Ĝenevo, Bolzano, Rio de Ĵanejro kaj Sanfrancisko estas urboj aŭ urbegoj, sed ne estas ĉefurboj. Diru la ĉefurbon de via lando. Nomu malĉefurbon en via lando.

Multaj ĉefurboj estas urbegoj, ekzemple: Meksikurbo, Moskvo, Tokio, Najrobo…
Multaj ĉefurboj ne estas urbegoj, nur urboj. Ekzemple: Kanbero en Aŭstralio, Otavo en Kanado, Berno en Svislando, Brazilio en Brazilo, Wellington en Nov-Zelando…

Kio estas **urbeto**? Malgranda urbo! Kio estas **vilaĝo**? Eta eta urbeto.

Zuriko kaj Bazelo ne estas urbetoj. Rodersdorf estas urbeto. Tuluzo kaj Liono ne estas urbeto: Villefranche-sur-Saone estas urbeto (*Prononco:* Vilefronŝ-sur-Saŭn).
Budapeŝto ne estas urbeto: Szentendre estas urbeto (*Prononco:* Sentendre)
Londono ne estas urbeto: Aberystwyth estas urbeto (*Prononco:* ege malfacila)

Budapeŝto kaj Szentendre ne estas vilaĝoj. Kocsi (pron. Koĉi) estas vilago en Hungario.
Hamburgo kaj Munkeno ne estas vilagoj. Mallersdorf estas vilago en G________.
Ĝenevo kaj Berno ne estas vilagoj. Bosco-Gurin estas vilago en S__________
Tokio kaj Hiroŝimo ne estas vilaĝoj. Nakamita estas vilaĝo apud Hiroŝimo en J_________.

# 28. Gvidu kvizon!

Gvidu kvizon en via grupo. Kio estas kvizo? Demando-ludo! Uzu la listojn. Skribu aliajn listojn. Skribu demandojn kaj respondojn. Elektu kvizo-gvidanton. Elektu teamanojn. Elektu personon kiu skribas la poentojn por la teamoj kaj diras la rezultojn en la fino.

| Diru pri la lokoj: Ĉu lando, urbo, ĉefurbo, vilaĝo? | Ĉu vivas, ne vivas? Ĉu besto, persono aŭ senviva objekto? | Ligu la lingvojn kun la urboj! (Du lingvoj ne apartenas al urbo.) (Du "lingvoj" ne estas lingvoj.) | |
|---|---|---|---|
| Amsterdamo | Adelo | 1. Bonaero | A: angla |
| Andoro | buso | 2. Bankoko | B: araba |
| Berlino | fiŝo | 3. Kairo | C: ĉina |
| Burkina Faso | helikoptero | 4. Lisbono | Ĉ: flandra |
| Eketahuna | kato | 5. Londono | D: franca |
| Hamburgo | kajto | 6. Madrido | E: germana |
| Jorko | gvidanto | 7. Mombaso | F: hispana |
| Kanbero | Petro | 8. Moskvo | G: japana |
| Kebekio | pupo | 9. Munkeno | Ĝ: naŭpieda |
| Nakamita | rano | 10. Nagojo | H: nederlanda |
| Otavo | Rikardo | 11. Nov-Jorko | Ĥ: norvega |
| Peruo | sako | 12. Oslo | I: portugala |
| Roterdamo | serpento | 13. Parizo | J: rusa |
| Sidneo | tendarano | 14. Pekino | Ĵ: svahila |
| Slovenio | urso | 15. Roterdamo | K: svis-germana |
| Tuniso | ruso | 16. Sao Paŭlo | L: tajlanda |
| Tunizio | Veroniko | 17. Tokio | M: ursa |
| Zagrebo | zebro | 18. Zuriko | N: zulua |

**Al kiu urbo aŭ lando apartenas la bildo?**

①



②



③



④




⑤



⑥



# 29. Tri turistoj... ne en Romo



Sinjoro Brown estas turisto. Li loĝas en Londono. Sed nun li vizitas Parizon. Li vizitas la turon *Eiffel* kaj la katedralon *Notre Dame* kaj la Muzeon *Louvre.* Nun li sidas en restoracio en *Champs-Elysées.*

Ĉu li trinkas vinon? Ne, li trinkas teon kun sukero kaj lakto.




Ankaŭ sinjoro Le Brun estas turisto. Li loĝas en Parizo. Sed nun li vizitas Budapeŝton. Li vizitas Muzeon Kovács Margit en *Szentendre.* Li vizitas la preĝejon Matiaso, la insulon Margareta kaj la operon. Nun li sidas en restoracio en Vaci strato. Ĉu ĝi estas hungara restoracio? Ne, ĝi estas franca. Li manĝas ranojn kaj helikojn kaj trinkas francan ĉampanon.

Ankaŭ s-ro Barna estas turisto. Li loĝas en Budapeŝto. Sed nun li vizitas Londonon. Li vizitas la Turo-ponton, la katedralon de Sankta Paŭlo, la Palacon *Buckingham* kaj la horloĝ-turon de la sonorilo *Big Ben.* Nun li sidas en restoracio en *Oxford* Strato. Ĉu li trinkas varmetan bieron? Ĉu li manĝas fiŝon kun fritaĵoj? Ne, li manĝas gulaŝon kun hungara vino el Egero!




Kiu vizitas Londonon? Kiu vizitas Budapeŝton? Kiu loĝas en Budapeŝto? Kiu trinkas ĉampanon? Kiu vidas la turon Eiffel? Kiu sidas en Vaci strato? Kiu vidas la horloĝ-turon de Big-Ben? Kiu manĝas helikojn kaj ranojn? Kiu vizitas art-muzeon en *Szentendre?* Kiu vizitas art-muzeon en Parizo?

La nomo de la preĝejo en Budapeŝto estas ...
La nomo de la palaco en Londono estas ... Kio alia estas en Londono?
La nomo de la insulo en Budapeŝto estas ...
La nomo de la turo en Parizo estas ... Kio alia estas en Parizo?
En kiu itala urbo estas palacoj kaj art-muzeoj? En kiu itala urbo estas fama turo?
En kiu itala urbo estas estas fama operejo? En kiu itala urbo estas fama katedralo?

Ĉu vi loĝas en ĉef-urbo? Ĉu vi logas en vilaĝo? Ĉu vi logas en Eŭropo? Ĉu vi loĝas en Ameriko? Ĉu vi loĝas apud katedralo? Ĉu vi loĝas apud restoracio? Ĉu vi loĝas apud tendaro? Ĉu vi loĝas apud preĝejo? Ĉu vi loĝas apud muzeo?

Ĉu vi ŝatas gulaŝon? Ĉu vi ŝatas fiŝojn? Ĉu vi ŝatas ranojn? ...helikojn? ...ĉampanon?
Ĉu vi ŝatas Parizon? Ĉu vi ŝatas Londonon? ... Budapeŝton? Ĉu vi ŝatas la urbon, kie vi loĝas?

Kiam en Romo, kondutu kiel la rominaroj – jen proverbo. Certe la tri turistoj ne scias ĝin!


# 30. Iras al... iras de, iras tra...




Kio estas tio? Tio estas rado. Ĝi estas ŝtona rado.




Rikardo iras tra la rado.



La rado iras de Rikardo al Roĝero.



La rado iras de Roĝero al Rikardo.




La rado iras de Rikardo al ... tendo tri.



La rado iras tra la tendo.



Tio estas parto de tendo.



Tio estas parto de rado.




Tio estas parto de Rikardo.





Tio estas parto de Roĝero.

## MAPO DE BELOLANDO




Kiu transportilo iras de...

1. Belurbo al Ĉefurbo?
2. Sunurbo al Lunurbo?
3. Belurbo al Bonurbo?
4. Steurbo al Ĉefurbo?
5. Belurbo al Bonurbo tra Stelurbo?
6. Sunurbo al Belurbo tra Mezurbo?

Ĉu la aviadilo de Belurbo al Bonurbo iras super la...:

1. ŝoseo inter Ĉefurbo kaj Mezurbo?
2. ŝoseo inter Mezurbo kaj Lunurbo?
3. fervojo inter Belurbo kaj Ĉefurbo?

Diru vojojn por ĉiu transportilo:

1. de Ĉefurbo al Belurbo.
2. de Sunurbo al Ĉefurbo.
3. de Stelurbo al Belurbo.
4. de Lunurbo al Stelurbo.
5. de mezurbo al Bonurbo.

Kiu urbo ne havas fervojon? Inter kiuj urboj ekzistas du rektaj vojoj? Planu turisman vojaĝon en Belolando!